



2(180)
2021

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo **ESPERANTO**

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Karolo Piĉ (1920 – 1995)

Obsedo – parto Printempo

Jam birdoj kantas. Kaj galantoj
blankas ĉe muroj. Domverandoj.
Lastaj degeloj. Akvo fluas
sub la ĉielo, kiu bluas.
Printempa varm'. Aero freŝa.
Mola suspir' kaj bru' kaleŝa.
Veturi ien. Ien iri.
Ricevi ĉion. Kaj admiri.
Vi estas juna. Juna floro.
Vi ardas pro la kisfervoro.
Sed vi ne venos. Sonril'
vane sonoras. Mutoj mil.
Kaj mi malgajos. Skua tristo.
Peza malĝojo de ekzisto.

Lantern' eklumis. Violon'
susuras. Silkvelura ton'.
Printempo tintas, tintas tinte.
Viaj du mamoj staras pinte.
Primolo. Pasko. Kaj viol'.
Eta bukedo. Bonodor'.
Lantern' eklumis. Kantas kluzo.
Primolo flavas pro ĵaluzo.
Du mamoj pintas. Muzo. Bluz'.
Viaj du mamoj. Por amuz'!

Vespert', krepusko kaj malklaro.
Nur unufoje dum la jaro
ekfloras la blazonlilio.
Vesperaj kisoj sub tilio.
Vi estas juna. Nigra haro.
Brunaj okuloj. Gaja paro.
Vi volus ami. Vi eĉ amas.
Via knabina korpo flamas,
sed ĝis nun nur solece, vane,
nur por neni, nur malsane.
Ho korpo krio! Karnoveo!
Preĝu en Piaristpreĝejo!

Sub la arkaroj vento blovas.
Unu kaj unu krur' sin ŝovas.
Du kruroj, viaj kruroj iras.
Sube la pavimbrikoj miras.
Supre la jupo ĉion kovras
(la krurojn, kiuj ammanovras!).
Lanterno lumas, lumas blinde.
La horloĝturo sonas tinte.
Tintin' arĝenta. Klingoklango.
Arkaroj. Jupo. Via sango.

Karel PIĈ, ĉeĥo, akademiano, aŭtoro i.a. de romano „La litomiŝla tombejo” (1981) kaj de poemoj „Angoro” (1982) kaj „Obsedo” (1984) verkitaj per originala, tre individua lingvaĵo kun multaj neologismoj.

La bela vizaĝo

Nino estis la bakista majstro-aspiranto konata pro sia bela vizaĝo. Tio estis efektive la plej bela vizaĝo en la ĉirkaŭaĵo kaj ĉiuj knabinoj deturnadis la rigaudon, kiam Nino trapasis straton, tiel allogis ilin la bela vizaĝo de la juna bakisto.

Bedaŭrinde Nino laboris ĉe forno, en humida kaj varma bakejo, tio tamen, kiel sciante, malbone influas al belaj vizaĝoj. Krom tio li havis fojfoje ĉagrenojn, kiel ĉiuj homoj, kaj sciante, ke ĉagrenoj malhelpas al la beleco. Rezulte Nino rigardante sin en la spegulo triste konstatis, ke sur la bela vizaĝo la vivo komencas malrapide kaneli sian spuron. Malgraŭ tio, ĝi estis daŭre eksterordinare bela kaj Nino estus ema gardi ĉi belecon antaŭ malico de la tempo. Li do ekplanis vojaĝi al urbo Lipoli, kie oni vendadis specialajn kofretojn por konservi la vizaĝojn. Tia kofreto estis multekosta kaj Nino devis pruntepreni monon de la najbaroj, por ĝin pagi. Li tamen opinii, ke la afero estas tiom grava, ke valoras fariĝi ŝuldanto. Li aĉetis do kofreton kaj kaŝis sian vizaĝon en la sekura kaŝejo.

[...] Dum la unuaj semajnoj li la vizaĝon elprenadis singardeme el la kofreto kaj vestadis ĝin dum festaj tagoj. Sed li rimarkis baldaŭ, ke ankaŭ dum festaj tagoj okazadas al homo ĉagrenoj kaj klopodoj kaj la vizaĝo povas difektiĝi. Li decidis do ne elpreni ĝin el la kofreto entute kaj de tiam neniu jam povis rigardi belan vizaĝon de Nino. Knabinoj ĉesis lin rimarki, ĉar Nino sen la vizaĝo ne interesis ilin entute. Homoj, kiuj pli frue montradis al si per fingroj lian belan vizaĝon, preterpasis nun indiferente homon sen la vizaĝo. Nino tamen tiel timis pri sia beleco, ke ĉesis eĉ okulumi al la kofreto por ne ekspone la belan vizaĝon al humino, suno aŭ vento.

La loĝantoj de la urbo forgesis rapide, kiel aspektas la vizaĝo de la bela Nino kaj li mem, ĉar ĉesis enrigardi en la kofreton, ne memoris jam preskaŭ, kiel aspektas. Malgraŭ tio, ege li estis fiera, kiam rememoris al si, ke estas la plej bela junulo en la ĉirkaŭaĵo. Fakte, li estis la plej bela, sed neniu povis tion rigardi propraokule.

Iu konata sciencisto de Lailonio, je la nomo Kru transveturadis ie tra la urbeto kaj malbona vetero devigis lin haltiĝi dum kelkaj tagoj en la loka aŭsterio. Li eksciis el interparoloj de gastoj pri kazo de Nino kaj ekdeziris lin ekkoni. Li do iris al dometo, kie loĝis la bela junulo kaj komencis kun li interparoli.

– Oni diras – alparolis Kru – ke vi estis la plej bela junulo en la ĉirkaŭaĵo.

– Ĝi estis vero – diris Nino.

– Ĉu vi povus tion pruvi al mi?

– Jes, mi povus – diris Nino. Tuj tamen venis al lia kapo, ke li devus tiu cele vesti sian vizaĝon kaj eltiri ĝin el la kofreto; dume vento kaj polvo devus difekti la belan vizaĝon. Do li aldonis rapide: mi povus, sed mi ne volas, ĉar mi havas la vizaĝon kaŝita.

– Do vi elprenu ĝin de la kaŝejo kaj montru.

– Mi ne povas, ĉar ĝi povus difektiĝi. Mi devas ŝpari mian vizaĝon.

– Kaj kial ĝuste vi ne uzas vian vizaĝon?

– Por havi ĝin pli longe ne difektitan.

– Tio signifas, ke en estonteco vi ĝin uzados?

Nino enpensigis. Ĝuste li ne meditis ĝis nun pri tiu afero detale. Li opinii, ke li devas ŝpari la vizaĝon, sed ne sciis klare, ĉu en estonteco li ankoraŭ iam ĝin surmetos.

– Mi ne scias – li diris – ĝuste mi ne scias pro kio mi ĝin uzadus. Mia sperto instruas min, ke oni povas perfekte vivi sen la vizaĝo.

– Jes, oni povas – konfirmis la dokta Kru – multaj homoj vi vis sen la vizaĝo. Sed ĉu tiel oni vivas pli bone?

– Nu, ne – respondis Nino. – Sed la vizaĝo ne difektiĝas.

– Do vi konservas ĝin tamen por estonteco?

– Mi volas, por ke ĝi estu eterne bela.

– Por kiu?

– Por neniu. Ĝenerale, por ĝi estu bela.

– Mi timas – diris Kru – ke vi volus maleblaĵon.

Tion dirante li adiaŭis Ninon kaj foriris kompateme kapsvingante.

Intertempe antaŭlonge jam pasis tempo, kiam Nino devis pagi la sulfon faritan pro aĉeto de la kofreto. Sed la bakista aspiranto perlaboros malmulte kaj Nino ne havis monon. La najbaro-kreditoro postulis kategorie redon non de la prunto, minacante per juĝo kaj malliberejo. Nino enfalis en la malesperon. Neniu jam volis pruntedoni al li, se oni sciis, ke li antaŭan fronton ne pagis. Kaj en Lailonio oni punas per malliberejo kontraŭ ne pagitaj ŝuldoj.

Post longaj internaj bataloj kaj senefikaj provoj gajni monon Nino decidis revendi la kofreton en la vendejo kaj surmeti sian vizaĝon ree. Li veturis al la urbeto Lipoli kaj iris al la butikoj, kie li iam aĉetis sian kofreton.

– Mi volus revendi sian kofreton – li diris.

– Kiam vi ĝin aĉetis? – demandis la vendisto.

– Antaŭ dek kvin jaroj – diris Nino. Ĵus en ĉi tiu momento li konsciiĝis, ke jam dek kvin jarojn li kaŝas sian vizaĝon en la kofreto kaj tio lin konsolis, ke tamen tiom da jaroj pli longe li konservis sian junan kaj freŝan vizaĝon.

– Sed la vendisto ekridetis ŝajnkompatate – dek kvin jarojn – li diris. – Rigardu ĉi tiun kofreton. Ĝi estas tute trafrotita, ŝirumita, derom pita kaj eluzita. Neniu aceton de mi tian kofreton duan fojon. Mi ne vendos ĝin eĉ kontraŭ deka parto de la primara prezo. Ne, mia kara Nino, mi ne reaĉetos tiun kofreton.

– Ja – elbalbutis Nino timigita – mi ne povas nun redoni monon, kiun mi prunteprenis por aĉeti la kofreton. Kion fari?

– Mi ne scias, kion vi faru, mia kara Nino. Mi ne povas pagi viajn ŝuldojn. Ĉiu mem pagas siajn ŝuldojn kaj devas bone pripensi antaŭ ol li prunteprenos la monon.

Nino Elitis subpremita kaj timigita. Li vidis antaŭ si perspektivon de la malliberejo kaj neniu pripensu venadis al lia kapo. Li revenis hejmen, kie jam atendis lin gardisto, kiu ordonis al li morgaŭ posttagmeze veni pro alvoko al la juĝejo. Nino meditis dum la tuta nokto. Matene li decidiĝis kaj veturis denove al la urbeto Lipoli.

Ĉi foje li iris al lombardo, kie oni pruntedonadis monon kontraŭ valoraj objektoj.

– Mi volus gajni prunteprenon en alto de tricent patronaloj. (Patronalo estas la ora monero lailonia; tiom ĝuste kostis iam la kofreto.)

– Kion vi volas doni al mi garantio? – demandis posedanto de lombardo.

– Mi donas al vi – diris Nino – mi donas al vi la propran, belan vizaĝon, ne tuŝitan de tempo kaj kofreton de neŝanĝebla.

– Tuj mi kontrolos – diris la proprietulo. Li prenis el breto libron, kie oni enskribis prezojn de ĉiuj homaj vizaĝoj. Li apertis la kofreton kaj kontrolis per lupeo la vizaĝon de Nino. Ĝi estis efektive juna kaj preskaŭ ne tuŝita. Nino kortuŝiĝis iome, ĉar li vidis ĝin unuan fojon de multaj jaroj.

Poste la proprietulo kontrolis ankoraŭ la kofreton kaj post longa rigardado deklaris:

– Kontraŭ la vizaĝo kune kun la kofreto mi povas pruntedoni ducent patronalojn kaj nek unu groŝon plu. Post duono da jaro vi reaĉetos ĉion de mi kontraŭ tricent patronaloj.

Ili estis pezaj kondiĉoj kaj Nino ekhezitis; cetere la proponita sumo estis ankoraŭ pli malalta ol lia ŝuldo. Tamen en la ĉirkaŭaĵo ne estis alia lombardo kaj cetere estis dubinde, ĉu aliloke oni donus al li pli multe.

– Bone, mi konsentas – diris Nino, ĉar kion alian li faru. Li postrestis la kofreton kun la vizaĝo, prenis ducent patronalojn kaj iris al sia urbeto, kie alkuris tuj al la najbaro-kreditoro. Li redonis al li ducent patronalojn kaj promesie la reston redoni baldaŭ. Li ne sciis, verdire, kiamaniere li gajnos tiun sumon, sed nenion alian li ja povis diri. La najbaro konsentis senvalidigi la plendon al la juĝo, sed li antaŭdiris, ke la reston li atentos ne pli longe ol duonon de la jaro.

Nino restis en ŝancelo kaj de primo. Ne minacis al li momente malliberejo, sed denove li havis grandajn ŝuldojn kaj la vizaĝon li ne havis.

Pasis ses monatojn, dum kiuj Nino faris senĉese viglajn strebojn por gajni kian ajn monon, por pagi al la najbaro kaj elaĉeti sian vizaĝon el lombardo. Ĉio vane. Pasis ankoraŭ tri monatoj kaj senpaciencigita najbaro denove plendis lin al la juĝejo. Okazis proceso kaj Ninon oni fermis en la malliberejo pro la ŝuldoj.

La posedanto de la lombardo en Lipoli longe atendis Ninon, kiu planis elaĉeti sian kofreton kun la vizaĝo. Li ne ĝisatendis tamen. Enuigita li konkludis, ke nenio jam de tio rezultos. Li eltiris la vizaĝon de Nino el la kofreto kaj donis ĝin al la infanoj ludi. La infanoj el la vizaĝo de Nino faris por si pilkon kaj per ĝi retpilkis. Post nelonga tempo neniu jam povus konjekti, ke la malnova pilko estis iam la bela vizaĝo de la juna Nino.

Sed Nino nenion pri tio scias. Li vivas en malliberejo kaj havas almenaŭ unu konsolon. Al ĉiuj, kun kiuj li interparolas, rakontas, ke havas la belan, tre belan vizaĝon, kiun nenio difektos.

– Mi vere havas la plej belan vizaĝon en la ĉirkaŭaĵo – li rakontas. – Ĝi estas fermita en speciala kofreto, kie ne povas difektiĝi. Vi ekvidos ĝin ankoraŭ. Vi ekvidos, kiel ĝi estas bela!

Tiel konsolas sin Nino en la malliberejo. Li restas tie daŭre kaj certas, ke havas la plej belan vizaĝon sur la mondo.

En la urbeto multaj homoj lin bedaŭras. Ili opinias, ke Nino estas malfeliĉa, kvankam li mem kulpas pri sia malfeliĉo, ĉar ja li devus scii, ke nur tre riĉaj homoj povas permesi al si havi kofretojn en kiuj belan vizaĝon povas konservi sendifekte.

Intertempe la infanoj de la lombard-posedanto ludas sur la korto pilon, kiu de tago al tago fariĝas pli kaj pli malbona kaj pli kaj pli taŭga por ludi.

tradukis *Lidia Ligeza*